# KOMENCANTO 6 '98

gazeto por komencantaj esperantistoj kaj komencantaj aŭtoroj

## redakcie

Karaj legantoj!

La sesa numero estas fin-fine antaŭ vi. Ni petas pardonon kaj esperas, ke ne plu okazos tiom longaj prokrastoj.

En tiu-ĉi numero rakonto pri Universala Kongreso de UEA en Francio kaj agrabla vojaĝo tra Eŭropo de nia pli ol 40-persona grupo de esperantistoj.

La vica prezentata periodaĵo estas :

La KANCERKLINIKO kaj ĝia redaktoro kaj eldoninto *Ĵak Le Puil.*

En garmatika parto laŭ petoj de la legantoj ni revenis al la temo GRAMATIKO kaj GEOGRAFIO por doni korektajn nomojn de la plej gravaj urboj.

Vin atendas tre bona fikcia rakonto de *Leonio Tolmaĉev,* renkontiĝo kun niaj malnovaj amikoj *Bill Thorne* kaj *Ludmila Leksina.*

Ni daŭrigas nian KONKURSON, la plej interesajn taskojn prezentas hodiaŭ *Aleksandr Volkov el* Baŝkirio, Ruslando. Li preskaŭ sola faras la 7-an paĝon kaj sur la kovrilo vi nun vidas lian desegnaĵon.

Tradiciaj korespondadresoj sur la dorsa paĝo.




*(Aleksandr Volkov)*

KOMENCANTO
**1998 numero 6**
**fondita** en 1992
8 numeroj jare
**redaktas kaj eldonas**: Viktor Kudrjavcev
**konstanta kunlaboranto:** Rafija Jafasova
**adreso**: 620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Ruslando
**abontarifo** por 1998:
*internacia tarifo*:
24 nederlandaj guldenoj aŭ 12 usonaj dolaroj
*orienteŭropa kaj latinamerika tarifo*:
10 usonaj dolaroj
aŭ por ĉiuj — 15 IRK
**konto ĉe UEA**: vkud-a
*ruslanda tarifo*:
32 рубля (за 8 номеров в год) простым почтовым переводом на имя Кудрявцева Виктора Васильевича: 620041, Екатеринбург, аб. ящ. 132

PERANTOJ de KOMENCANTO

*laŭ ĉi-subaj adresoj vi povas aboni nian gazeton*

ĈEĤIO
Vladislav Hasala, A.Dvoráka 1, CZ-696 62 Strážnice
ESTONIO
Virve Ernits, Mahla 65 — 1, EE — 0012, Tallinn
ITALIO
Viŝnja Brankoviĉ, Via Leghissa 6, IT-34131 Trieste
POLLANDO
Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskego 77-137, PL-01-865 Warszawa
SVEDIO
SEF, Lisbet Andréasson, Södra Rörum pl 455, SE — 24294 Hörby
SVISLANDO
Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH — 4224 Nenzlingen
UKRAINIO
Dmitrij Cibulevskij, ab.skr. 9307, UA — 310003, Ĥarkiv

# La 83-a UNIVERSALA KONGRESO

*KOMENCANTO ne estas urĝ-nforma gazeto, ne estas nia celo priskribi okazintaĵojn. Sed ĉar multaj el niaj legantoj-komencantoj nenion aŭdis pri Universalaj Kongresoj kaj UEA, kaj la redakcia teamo prokrastis la aperigon de la kvina kaj la sesa numeroj ĝuste pro preparo al kaj partopreno en la 83-a Universala Kongreso, ni decidis rompi nian kutiman serion pri la esperantistaj amaskomunikiloj kaj doni iom da informoj pri tiu evento.*

La plej grava kaj multenombra ĉiujara renkontiĝo de esperantistoj en la mondo estas Universala Kongreso de Esperanto, kiun organizas UEA — Universala Esperanto-Asocio. Ekde la unua kongreso jam okazis 83 UK-oj. Nur la unua kaj la dua mondmilitoj ne permesis okazigi la kongresojn seninterrompe.

La Unua Kongreso de Esperanto okazis en aŭgusto de 1905 en franca urbo *Boulogne sur Mer*. Ĝin organizis kelkaj grupoj kaj kluboj esperantistaj. Partoprenis 688 partoprenantoj kaj la mem majstro Ludoviko Zamenhof. La sukceso estis grandioza. En aprilo de 1908 estis fondita UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO — UEA, kiu ekde tiam prenis en siajn manojn organizadon de Universalaj Kongresoj.

Plejparte la kongresoj okazis en eŭropaj landoj, sed estis ankaŭ en Usono trifoje, en Brazilo, Japanio, Islando, Suda Koreio, Kanado, Aŭstralio. La plej multenombra kongreso okazis en la jaro de centjariĝo de la Internacia lingvo 1987 en la devenolando de esperanto - Pollando, en Varsovio kun 5946 aliĝintoj!

La 83-a Universala Kongreso okazis ĉi-jare en la franca urbo Montpeliero la 1-an — 8-an de aŭgusto 1998. Ĝi fariĝis la plej granda Universala Kongreso, okazinta en Okcidenta Eŭropo post la dua mondmilito. Ĝin aliĝis 3095 esperantistoj el 71 landoj. Inter la kongresanoj estis rekorde multaj ruslandanoj - 182! La plej multaj aliĝintoj estis el Francio - 780, poste el Japanio - 253 kaj Germanio - 192.

Nian vojaĝon al la ĉarma suda Francio organizis Esperanto-Centro Ekaterinburg. 46 partoprenantoj el diversaj urboj de Ruslando veturis per komforta buso tra Pollando, Slovakio, Aŭstrio, Italio, kie ni promenis inter la belaĵoj de Venezio kaj poste veturis al Montpeliero. La vetero estis bonega, eble eĉ tro, kaj ni ĝuis la belan urbon, la mediteraneon, ekskursojn, inter kiuj estis Marsejlo, la romiaj antikvaĵoj de urboj Nimeso, kaj super la rivero *Garo* akvedukto, kies aĝo estas 2000 jaroj, kiu tamen tre bone konserviĝis.

NI tre bone kongresis. La kongresa temo ĉi-foje estis: "Mediteraneo - ponto inter kulturoj". Ĉiuj trovis al si okupon laŭ sia plaĉo. La programo de la kongreso estis kiel kutime tre diversa. La oficialaj kunsidoj, raportoj, elektoj de la estraro paralelis aŭ sinsekvis kun renkontiĝoj de skoltoj, junuloj, ĵurnalistoj, artistoj, poŝtistoj, Oomoto, fervojistoj, radio-aŭskultantoj, naturkuracistoj, juristoj, amikaro de Bruno Groning, komercistoj. Okazis tradiciaj kongresa balo, bankedo, renkontiĝo kun la urbestro. Laboris kursoj kaj ekzamenoj la tutan periodon funkciis libroservo. Elpaŝis talentaj artistoj kaj muzikistoj. Mikaelo Bronŝtejn el Ruslando havis tre sukcesan prelegon "Aleksandro Puŝkin: legendoj pri vivo kaj morto".

La 8-an de aŭgusto frumatene nia grupo forveturis al Parizo, de kie post dutaga ĉeesto venis hejmen tra Germanio, Ĉeĥio kaj Pollando. La tuta vojaĝo tra 7 landoj estis impresoriĉa kaj sufiĉe malmultekosta.

Mi kaj mia kunlaboranto pri KOMENCANTO Rafija Jafasova restis en Parizo por ankoraŭ unu semajno dank'al efektiveco de PASPORTA SERVO. Neforgesebla restos somera Parizo !

La sekva 84-a Universala Kongreso okazos en Germanio en la urbo Berlino. Ni rekomendas al ĉiu esperantisto almenaŭ unu foje en la vivo partopreni UKon!

*(Viktor Kudrjavcev, Rafija Jafasova, KOMENCANTO)*

DANKON !
Al *Bill Thorne* pro lia donaco por KOMENCANTO
$15

La sekva numero de KOMENCANTO aperos la 15-an de oktobro 1998


# La KANCERKLINIKO

Hodiaŭ ni rakontas pri la revuo, kiu staras iom aparte de eldonoj, pri kiuj ni jam rakontis. Ĝi ne apartenas al iu asocio aŭ organizaĵo, ne estas ies oficiala organo. Ĝi estas **politika *kultura *skandalema *ajnista.* Ĝi estas La KANCERKLINIKO.

Antaŭ 11 jaroj dum la Junulara Kongreso (Kongreso de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo — TEJO) en 1987 en Krakovo, (Pollando), mi konatiĝis kun unu franco, kiu laŭ aĝe jam delonge ne estis junulo, sed liaj brilaj okuloj montris lian junan animon, energion kaj spritan saĝon. Lia nomo estis *Ĵak Le Puil.* Li tiam enmanigis al mi kelkajn ekzemplerojn de la revuo, kiu havis strangan nomon — La KANCERKLINIKO. Ni bone konatiĝis dum tiu kongreso, la tutan nokton *Ĵak* kaj lia ĉarma edzino *Armel* kantis bonegajn belsonajn kanzonojn akompane de gitaro, kiun nia gasto bonege regis. La tuta nia "sovetia junulara delegacio" okazis ĉarmigita de la familio *Le Puil.*

Pasis 11 jaroj kaj dum la 83-a Universala kongreso mi denove renkontiĝis kun la gesinjoroj *Le Puil.* Ili malgraŭ ĉio restis same bravaj kaj ĉarmaj homoj.

Mi petis de *Ĵak* intervjuon pri lia revuo. Li nur kurte respondis, ke la ideo de LKK venis al li kaj liaj kamaradoj antaŭ 21 jaro, kaj de tiam la revuo regule aperas kaj ĝojigas sian legantaron. Ili estis triope - *Danvy - Septier -Le Puil.*



*Bill Thorne*
(Londono)

Tiutempe ili prizorgis SAT-junularon kaj forte ne komprenis la estraron de SAT kaj reciproke. Do ili protestis, kaj ilia protesto efektiviĝis en la formo de revuo, kiu estas plene sendependa tamen **politika *kultura *skandalema *ajnista.* La numero "0" aperis en 1976. Pri ĉio alia Ĵak permesis al mi skribi memstare. Kion mi ĉi-sube kuraĝas fari. La revuo havas 28 paĝojn, unukoloran kovrilon kaj aperas 4 foje jare. Kio estas la enhavo de LKK?

La revuo havas konstantajn rubrikojn, ekzemple La KURACOSERVO, kiun gvidas la redaktoro mem. Povas temi pri politikaj kaj ekonomiaj eventoj el la franca politika vivo, ekzemple pri *Nacia komitato de tabakismo,* kies estroj alproprigas monon, aŭ pri *Nacia Fronto,* pri Usono, Israelo, Kanado, Ĉinio... kun sarkasmo kaj personaj atakoj. Ceterajn paĝojn okupas tre diversaj aŭtoroj el la teamo de kunlaborantoj. Ili estas tre konataj esperantistoj el la plej diversaj partoj de la mondo, inter ili estas jam konataj al vi *Stefan Maul,* fondinto de MONATO kaj *Mikaelo Bronŝtejn* el Ruslando.

Estas multaj desegnaĵoj, komiksoj, poeziaĵoj vere nekutimaj. Aperas recenzoj kaj tradukaĵoj. Estas foje rubriko "La KANCERKLINIKO bis" kun aktualaj informoj el e-gazetoj kaj organizaĵoj. En ĉiu numero listo de libroj kaj kasedoj vendataj. Estas vendataj 4 diversaj kasedoj kun kanzonoj kaj plenumo de *Ĵak Le Puil.* Se vi foje aŭskultos la ĉarman voĉon de Ĵak, vi certe enamiĝos en ĝin.

Estas multo alia kaj mi ne povas per unu frazo diri kio. Estas diversa kaj nekutima. Tiom nekutima, ke mi rekomendas al vi mendi la provekzempleron ĉe la eldoninto kaj mem decidi. La jara abono estas 125 Francaj frankoj. La adreso: Ĵak Le Puil, "Les Cooherats", F-18210, THAUMIERS, France.

## LKK aforismoj

*ni prezentas kelkajn aforismojn el LKK*

Tra Bertil Englund

***

Kun filozofoj oni parolu kiam ili havas dentodoloron
*(Mark Twain)*

La amo estas la sola vojo sur kiu eĉ la stultuloj atingas certan grandecon
*(Balzac)*

Multaj homoj preterlasas la malgrandan feliĉon ĉar ili vane atendas la grandan
*(Pearl Buck)*

Multaj homoj uzas monon, kion ili ne havas, por aĉetado de objektoj, kiujn ili ne bezonas, kun la intenco imponi al tiuj, kiujn ili ne ŝatas
*(Leo Slezak)*

La sanulo havas multajn dezirojn, la malsanulo nur unun
*proverbo*

Ĝentileco estas kiel aerkuseno, povas esti ke nenio estas en ĝi, sed ĝi mildigas la skuojn de l'vivo
*(A.Shopenhauer)*

Kie troviĝas geedzaj devoj, tie ekzistas eksgeedza plezuro
*(H.Miller)*

Kolektitaj de Aldo de'Georgi

***

Neceso estas patrino de ĉiuj inventoj *(Platono)*


Se ni havas du orelojn kaj unu solan buŝon estas fundamenta kialo: ni devas pli aŭskulti ol paroli
*ĉina proverbo*

# GRAMATIKO kaj GEOGRAFIO

*En la numero 4'1998 aperis tabelo de korektaj geografiaj nomoj de la landoj. La redakcio ricevis reehojn al la publikaĵo kun peto daŭrigi tiun gramatik-geografian laboron kaj prezenti tabelon de korektaj nomoj de ties ĉefurboj Ni volonte plenumas vian mendon, karaj legantoj, kaj esperas, ke tiu informa tabelo utilos por vi samkiel por ĉiuj komencantoj en iliaj eksterlandaj kontaktoj.*

## EŬROPO


Ĝenovo
Amsterdamo
Andoro Malnova
Ateno
Beogrado
Berlino
Berno
Bratislavo
Bruselo
Budapeŝto
Bukareŝto
Dublino
Erevano
Helsinko
Kiŝinevo
Kievo
Kopenhago
Lavaleto
Lisbono
Londono
Luksemburgo
Madrido
Minsko
Monako
Moskvo
Oslo
Parizo
Prago
Rejkjaviko
Rigo
Romo
Sanmarino
Sarajevo
Skopje
Sofio
Stokholmo
Tal(l)ino
Tbiliso
Tirano
Triesto
Vaduco
Varsovio
Vieno
Vilniuso
Zagrebo



*La tabelo de urbonomoj estas preparita laŭ la Poŝatlaso de la Mondo, Kartografie, Praha, 1971*

## AZIO

Aŝĥabado
Aŝabo
Abudabio
Amano
Ankaro
Astono
Bagdado
*Bakuo*
*Bandar-Seri-*
Begavano
Bangkoko
Bejruto
Biŝkeko
Damasko



Delhio
Djakarto
Duŝanbo
Hanojo
Islamabado
Jerusalemo
Kabulo
Katmando
Kolombo
Kualalumpuro
Kuvajto
Kvezono
Maleo
Maskato
Nikozio
Pekino
Pnompeno
Ranguno
Riado
Sano
Seulo
Singapuro
Taŝkento
Teherano
Timbo
Tokio
Ulanbatoro
Vjentiano

## AMERIKO

Asunciono
Bogoto
Bonaero
Bonespero
Brazilio
Briĝetauno
Georgtaŭno
Gvatemalo
Havano
Karako
Kingstono
Kvito
Limo
Managvo
Meksiko
Montevideo
Otavo
Panamo
Paramaribo
Porto Hispana
Portoprinco
Roseauo
Sandomingo
Sanjoseo
Sansalvadoro
Santiago
Sukreo
Tegicigalpo
Vaŝingtono





## AŬSTRALIO

### OCEANIO

Apio
Avarua
Avatio
Fagatogo
Honiaro
Jangoro
Kanbero
Papeto
Suvo
Velingtono




## AFRIKO

Ĝibuto
Ĥartumo
Abiĝano
Adisabebo
Alĝero
Baĵumburo
Bajdo
Banguo
Batursto
Bisao
Brazavillo
Dakaro
Daresalamo
Fretaŭno
Gaberono
Kairo
Kampalo
Kigalo
Kinŝaso
Konakro
Lagoso
Librevillo
Lomo
Lorencomarko
Luando
Lusako
Mogadiŝo
Monrovio
Najrobo
Niamejo
Nuakĉoto
Portluiso
PrajoMorono
Pretorio
Rabato
Sandeniso
Sanizabelo
Santomeo
Tananarivo
Tunizo
Viktorio
Zombo

fikcia rakonto

# RENOVIGO


*Leonid TOLMAĈEV*
[BOKSITOGORSK, Lenigradskaja obl.,Ruslando]



La unua delfeno eliris el la akvo sur la Teran surfacon 100000 jarojn postkiam dronis la lasta homo.

Ekdelonge sur la Tero najbare ekzistis du specoj de altraciaj bestoj. Grandaj homaspektaj simioj kaj delfenoj. En proceso de evolucio la homa raso progresis pli rapide. Sub la efiko de la homoj la raso de la delfenoj bremsis sian evoluon.

Sed la rezultoj de homaj agoj tuŝis ne nur delfenojn. Iliaj efikoj disvastiĝis por la tuta naturo de la Tero. La homoj en sia evoluo konstruis uzinojn, malpurigante akvojn kaj atmosferon, starigis grandegajn urbojn, kovrinte per asfalta kiraso fekundajn grundojn, ekstermis la bestojn kaj fiŝojn. Ili senĉese ekstermis unu la alian en sangaj militoj. Ili kreis terurajn armilojn, kapablajn dum kelkaj sekundoj eks termi la planedon mem.



La homoj en ĉio agis kontraŭ la naturo. Kaj fine venis por la homoj fatala tago. En rezulto de unu malsukcesa eksperimento okazis degelitaj la glacioj de Norda kaj Suda polusoj. La Tero dronis. La homoj provis saviĝi sur altaj montoj, sed tie ili pereis pro la komencintaj erupcioj de vulkanoj. Kelkaj savis sin per superrapidaj ŝipoj, kiuj tamen baldaŭ okazis dronigitaj per terura ŝtormo, tondranta super la Tero. Pri la homaro estis ĉio finita dum kelkaj monatoj.

100000 jarojn post la akcidento la akvo foriris. Sur la Tero komencis evolui vivo. Kaj ankoraŭ post 90000 jaroj la homojn sur la Tero ŝanĝis delfenoj. Ili ekloĝis sur la tera surfaco.

Estas nekonate, kio atendas la rason de la delfenoj en ĝia progreso, tamen la raso de la grandaj homaspektaj simioj subite bremsis sian evoluon.

✵ ✵ ✵

# DUELO

*inter niaj konstantaj aŭtoroj Ludmila LEKSINA el urbo SUDĴA, (Ruslando) kaj Bill THORNE, el urbo LONDONO, (Anglio)*







Li havis senteman palaton,
Kaj zorge plenigis la platon:
Kolbasoj kaj elo
Kun ĉina nudelo,
Sed tute ne vidis la blaton!

DE LI RO

Ho ve! Kia kulturo!
Bela kruro, ronda suro,
Femuro de veluro.
Kia trez*uro*, kia plezuro,
Poluro de humuro.
Sed mi estas dinosaŭro
Restas torturo,
Bedaŭro, agnosturo. Uro.




*(Bill Thorne)*

# Kial li kraĉis sur la plafonon?

*Ludmila LEKSINA* en KOMENCANTO 3 brile parodiis aŭtoron NEKONATULO. Ĉi-sube ŝi prezentas sian parodion al nia londona aŭtoro *Bill Thorne* por lia limeriko, "Estis juna viro..." (vidu KOMENCANTO 3). Aldone ni publikigas ŝian humuran versaĵeton pri konataj eventoj...

Estis juna viro el Kurgano
Kiu vojaĝis el Pskovo al Magadano
Ĉion devas li fari semajne,
Kiam li vojaĝis trajne?
Do li kuŝis kaj kraĉis sur la plafonon


AMERIKO ANTAŬEN !

La skandal' en Blanka Domo:
Flirtas prezidanto!
Nia bovo lian nomon
Nun ricevas dande
Interflustras fraŭlinoj:
"Li tentulo estas!"
Malserenas ĉiuj viroj:
"Li antaŭenvenas!"

# KONKURSO

Ni daŭrigas nian konkurson
La kondiĉoj estas publikigitaj en KOMENCANTO 5
Korektaj respondoj al la taskoj el K-5 aperos en K-7

*VOLKOV Aleksandr*
[Matrosova 44/19
TOLBAZI
452280, Baŝkirio
Ruslando]



*horizontale*

1. vaksa lumilo
2. geometria figuro
3. reklama folio
4. filino de miaj gepatroj

*vertikale*

1 kvargamba amiko *(sed ne lito!)*
2 oni batas ĝin dum paradoj
3 sur ĝi ne eblas dormi
4 verda simbolo de Esperanto

# Ŝercaj enigmoj

de *Aleksandr VOLKOV* [TOLBAZI, Baŝkirio, Ruslando]

*1. Kion faros korvo, vivinta tri jarojn?*
*2. Kiam por la nigra kato estas plej facile enveni en domon?*
*3. Je kio similas duono de oranĝo?*
*4. Sub kia arbusto sidas leporo dum pluvego?*
*5. Kion faras gardisto, kiam sur lia ĉapelo sidas pasero?*
*6. Kial la koko fermas okulojn, kiam kantas?*
*7. Filo de mia patro, sed por mi ne frato. Kiu estas?*
*8. Kio estas inter monto kaj valo?*
*9. Kiom da literoj estas en alfabeto?*
*10. Kiam sendentulo sentas doloron pro dentoj?*

# Serioza tasko

de *Bill THORNE,* (Londono)

Kiom da vortoj vi povas formi el la literoj de la vorto ESPERANTO? El du, tri, kvar, kvin literoj, ne gravas. Eblas formi verbojn, pronomojn kaj aliajn... Pli ol 28 estus bone!
Ekzemple: en, po, ano, reto, petas, espero...



*Aleksandr VOLKOV*
[TOLBAZI, Baŝkirio, Ruslando]

* * *

Ekzekutisto havas la milan jubilean ekzekuton. Sur la placo amasiĝas publiko. La ekzekutisto longe turnas sian glavon en la aero kaj diras:
- Spektaklo finiĝis
Lia viktimo ĝojas
- Ĉu la ekzekuto ne okazos?
- Sed vi klinu la kapon...

* * *

# KORESPONDU!

Ĉiu kadro kostas 6 rublojn aŭ 2 Internaciajn Respondkuponojn
Por pagintaj abonantoj de "K" - senpage

*Kjell Randehed*
50 ja.,fraŭlo, pri muziko, kulturo, ĝardenumo, vegetarismo, bestoprotektado
Rangvallagatan 30 C
256 63 Helsingborg,
SVEDIO
reto:ttt@helsingborg.mail.telia.kom

s-ino *Grazina Byczkowska*
44 jara oficistino, ŝatas turismon kaj dancadon
ul. Podjazdowa 6
60-480, POZNAN
POLLANDO

s-ro *Peter Bird*
ebleco de reciproka gastigado
3/8 Romney Rd.,
Heathpool SA,
5068, ADELAIDE,
AŬSTRALIO

*Annamaria Klemencz*
gimnazianino, korespondi tutmonde
Pa'pai u. 67
HU - 8551
NAGYGYIMOT
HUNGARIO

s-ro *Inos Fabeck*
s-ino *Viviane Fabeck-Thiltges*
bahaismaj ideoj
Emile Mayrisch str. 73
L-4470
ZOLWER
**LUKSEMBURGIO**

s-ro *Johano Abood*
pri bahaismo
P.O.Box 211,
2350
ARMIDALE,
NSW
AŬSTRALIO

s-ro *Pierre Daoust*
modernaj religiaj formoj, bahaismo
Rue du Try 1, 6100,
MONTIGNY LE TILLEUL
BELGIO

s-ro *Sharon Elliot*
bahaismo
Baha'i World Centre,
P.O.Box 155,
IL-31001
HAIFA
ISRAELO

s-ro *Arie Bouman*
kun skoltoj kaj pri skoltismo
Driestdreef 8,
9030
Gent-MARIAKERKE
BELGIO

s-ro *Martin Bahr*
skoltismo
Rasumefskygasse 2/26
AT-1030
WIEN
AŬSTRIO

*Jakobus K.Hammer*
skoltismo, instruado
Taxusstraat 7
1505 AA
ZAABDAM
NEDERLANDO

s-ro *Miguel A.Garcias,*
15 ja., kun junaj katolikoj pri diversaj temoj
Calle Maceo No. 72,
SANTO DOMINGO,
VILLA CLARA
KUBO

s-ro *Johannes Wieser*
51ja., seriozaj kontaktoj
Porcellangasse 48/III,
AT-1180
WIEN
AŬSTRIO

s-ino *Suzue Sakai*
36ja., volas korespondi kun la tuta mondo
1-5-13, Usiosinmati
KOOTI-SI
78-8008
JAPANIO

*Hans Bakker*
administrado kaj aliaj temoj
Kastelenstraat 231-11
1082 EG
AMSTERDAM
NEDERLANDO

s-ro *Brian R.Moon*
ebleco de reciproka gastigado
2 Om Klappchen
L-5682
DALHEIM
**LUKSEMBURGIO**

s-ro *Tuvija Meir-Rozenberg,*
goo
15/17 Shmorek str.,
IL-42462
NETANJA
ISRAELO

s-ro *David MacGill*
saĝeco de budhismo
48 Hood St.,
Walkari,
DUNEDIN
9001
NOVZELANDO

KORESPONDI...listo de dezirantoj korespondi enhavas pli ol 45 adresojn Sendu vian anoncon por senpaga enpresigo; aldonu 2 Internaciajn Respondkuponojn, se vi deziras ekzempleron. Lastan eldonaĵon vi ricevos sendante unu IRK aŭ 10 adresojn de seriozaj esperantistaj korespondemuloj el diversaj landoj.
R.MELO, 34, Avenue de Russie, FR.03700
BELLERIVE S/Allier, FRANCIO

## INTERNACIA KORESPONDA ADRESARO

Direktas: s-ro ***R.J.Zverina,*** 5. kventa 26, CZ-460 01 LIBEREC, ĈEĤIO.
Cirkulero de Eŭroregiona Esperanto-klubo en nordĉeĥa urbo Liberec.Pli ol 50 adresoj ĉiunumere. Publikigo de adreso estas tute senpaga. Petu informojn ĉe la eldoninto.

N